me raciste, est une partie de cette haine commune qui détruit tout le monde, le véritable patriotisme fait partie de ce grand amour universel qui construit, conserve et apporte le bonheur. L'esperantisme qui prêche l'amour et le patriotisme qui prêche aussi l'amour ne peuvent jamais s'opposer hostilement l'un à l'autre... »

Nous prions nos amis qui ont quelquefois à repousser l'accusation que réfute Zamenhof dans les lignes ci-dessus, de se souvenir de ses paroles. Elles ont gardé toute leur efficacité sincérité et puisqu'elles ont été prononcées il y a une trentaine d'années, personne ne peut les qualifier de plaidoyer de circonstance.

De *PROGRÈS DE LA SOMME* :

VERS LA RECONNAISSANCE D'UTILITE PUBLIQUE

Un sénateur australien, M. Abbott, appuyé au Parlement fédéral par un de ses collègues, M. Duncan-Hughes, a pris l'initiative d'adresser un pétition au roi Edouard VIII lui demandant de réunir une Conférence internationale chargée de trancher la question de la langue auxiliaire.

Quelle suite aura cette initiative ? On ne saurait le dire. Il serait en tout cas très désirable que l'idée de M. Abbott fut prise en considération.



En nia Federacio

Prezidanto : S-ro Albéric HUMEZ, 13 ter, rue Morel, à Douai
Sekretario : Jak. CENTNERŠVER, 9, rue Ferrand, à Valenciennes

Vivo de la Grupoj

En raison de la parution tardive du dernier numéro de Norda Gazeto, dans laquelle l'activité des Groupes est mentionnée, nous n'insérons que les communications parvenues en dernière heure, pour éviter double emploi avec N. G.

Mais à partir de décembre toutes les informations sur les groupes ou les isolés du territoire fédéral paraîtront régulièrement.

Pour ceci nous rappelons que nous sollicitons dans chaque groupe et dans chaque « loko » où il y a des esperantistes, un correspondant local de NIG qui se chargera de transmettre régulièrement chaque mois, les renseignements relatifs à la vie esperantiste locale.

Le rédacteur seul responsable de cette rubrique est le secrétaire fédéral, 9, rue Ferrand, Valenciennes (Nord). Il prie tous ses collaborateurs de lui envoyer leurs articles rédigés en français ou en Esperanto, avant le 20 de chaque mois. Merci d'avance!



AIRAINES. En août dernier, le groupe a reçu la visite de F-ino Cípero, esperantiste tchécoslovaque, qui après avoir félicité chaleureusement M^{lle} Yvette Revel, lauréate du concours entre les élèves, a parlé du mouvement esperantiste et de quelques coutumes nationales de son pays. Elle donna aussi quelques détails très intéressants sur les « bois de tourbe » de Franzensbad et diverses sources qui ont le pouvoir de... rajeunir.

Les cours ont repris le mercredi 14 octobre, salle de l'Écu de France, mise gracieusement à la disposition du groupe par M. Tuteur. Ces cours, guidés par M. Pierre Frenille, ont lieu chaque mercredi et sont suivis par une vingtaine d'élèves.

Les examens de l'Atesto pri lernado auront lieu le dimanche 15 novembre, à 16 heures. Tous les élèves du cours 1935-36 sont invités à se présenter à cet examen.

AMIENS. — A la suite de l'assemblée générale du 14 octobre, le Comité du Groupe Esperantiste d'Amiens est composé comme suit :

Président d'honneur : M. Ch. Tassencourt, 27, rue Boucher-de-Perthes ;

Vice-Président d'honneur : M. Maetz, 127, rue de Beaupis ;

Présidente : M^{lle} Colléalte, rue Le Mongnier ;

Vice-Président : M. Grisier, 49, rue Cozelle ;

Trésorière : M^{me} Victor, 43, rue Vatable ;

Secrétaire : M. Micolo, 26, rue de la Hotoie ;

Secrétaire-adj.-Bibliothécaire : M^{lle} Dieulot, 46, rue des Sergents ;

Membres du Comité : M. Sénéchal, 137, avenue du Général-Foy ; M. Despinoy, 11, route Nationale, Dury ; M. Descamps, 21, rue Turenne ; M^{lle} Serrasaint, 73, rue de Verdun.

Délégué de la Ligue Internationale Esperantiste : M. L. Moitié, 26, rue Dijon.

— Un cours élémentaire d'Esperanto a lieu tous les mercredis, à 20 h. 30, à l'Hôtel de Ville, et un cours supérieur tous les lundis, à 20 h. 30, à la Société Industrielle.

En outre, les réunions du vendredi avec causeries, conversations, lectures, jeux et chants en Esperanto, ont toujours lieu à l'Hôtel de Ville, à 20 h. 30.

— Résultats de l'examen « Atesto pri lernado » (ordre alphabétique) :

AMIENS. — Andrzejewska Justine, Catelas Henriette (M^{me}), Chantemesse Christiane, Deltour André, Descamps Marcel, Descamps Roland, Gabet Charles, Hennon Berthe (M^{me}), Joly Micheline, Lavallart Hugnette, Rayez Marthe, Renoust Emile, Renoust René, Richard Henriette (M^{me}), Tilloy André et Wattier René.

Section d'HÉNENCOURT. — Arnaud Christian, Arnaud Jeanne (M^{me}), Bernard François, Cambray Roger, Caron Jean, Cavillon André, Cavillon Louis, Darras René, Lefebvre Irénée, Lefebvre Léa et Sannier Roger.

ANZIN. — La 10^{me} de octobre okazis eksterordinara kunveno de la grupo por pridiskuti la motivojn de la eksigintenco de kelkaj komitatanoj. Post diskutado, oni decidis ŝanĝi iom la ĝisnunan konsiston de la grupkomitato. S-ro Gaston Lenglé estas reelektita kiel prezidanto, S-ro Gaston Mommaerts elektita kiel vicprezidanto, Sino Mommaerts kiel sekretario kaj delegitino de I.E.L. (2 bis, rue Ferrer, à Anzin), S-ro Léon Canonne reelektita kiel kasisto de la grupo.

— La kurso de F-ino Gertrudo Hansen partoprenas 23 personoj.

— La 18^{me} de octobre la grupo, oficiale invitita de la urbestro, partoprenis solenaĵojn kaj festenojn, organizitajn en Anzin honore al la urbestro S-ro G. Thiétard.

ARRAS. — Jam de la fino de septembro la grupo revigligis. La ĉiunmerkredaj kunvenoj estas bone vizitataj ĉe la Komerca ĉambro kaj estas agrable konstati ke multaj ekslernantojn de la Ĉe-metoda kurso regule ĉeestas la perfektigan.

— La 5^{me} de octobre nederlanda samideano S-ro Backermans vizitis la grupon kaj

ARRAS (suive).

rakontis kaj diskutis kun la aŭskultantoj. La novaj esperantistoj entuziasmiĝis pro tiu kunvika interparolado kun nia gasto.

— Merkredon la 22^{me} de oktobro okazis ekzamenoj por Atesto pri lernado por tiuj kiuj ĉesis sian lernadon antaŭ la libertempo.

— Mardon la 4^{me} de novembro : parolado de S-ro B. Sira, hungaro, pri « Esperanto ou 10 nacioj », je la 20^h k. 30 min., en la Komerca ĉambro.

— Merkredon la 10^{me} de novembro, nova kurso gvidata de S-ro Collot, ĉiumarde.

— Tre verŝajne S-ro Stuit gvidos kurson de la skoltaj kaj se eble de la fervojistoj.

— Unu el la novaj esperantistoj, S-ro Bastide, vojaĝis dum aŭgusto kaj septembro tra Aŭstrio, Hungarujo, Italujo, Svisujo ; ĉe li estis plejkore akceptita de la lokaj samideanoj. Li revenis konvinkita pri la praktika valoro de Esperanto kaj li promesis prelegi antaŭ la tuta grupo pri sia bela ekskurso.

Hedaŭrinde, li baldaŭ forveturos al Maroko ; jen nova perdo por nia grupo, kiu ĉi-jare perdis ; F-inojn Legrand kaj Roussel, S-rojn Devellennes kaj Leclercq.

CAUDRY. — La grupo klopodas aranĝi la 6^{me} de decembro grandan propagandan balon. S-ro F. Depreux, la vigla sekretario de la klubo presigas ĉiusemajne propagandajn artikolojn pri Esperanto en la loka gazetaro : L'Echo du Nord, Le Reveil du Nord, L'Éveil social kaj L'Action du Cambrais.

DENAIN. — Dimanĉon la 25^{me} de oktobro okazis en la Salle des Conférences, prelego de F-ino G. Hansen pri Danlando ilustrita per 70 belaj bildoj (bildkartoj projekcigitaj sur ekranon). Trideko da lokaj gesperantistoj ĉeestis tion tre interesan prelegon kaj varme aplaudis la paroladantinon.

— La kurso por komencantoj okazis ĉiunokte de la 18^h 30 ĝis la 21^h. — 15 novaj gelnantoj sekvas ĝin regule. Ĝi estas gvidata de S-ro Gauvin prezidanto de la grupo.

DOUAI. — Un cours pour les débutants, sous la direction de M^{lle} Yolande Leneugle, a lieu tous les mercredis à 20 h. 30, salle du Denier des Ecoles laïques, 5, rue Forlier.

— Aux Cours Municipaux de Douai, M. A. Humez dirige un cours d'Esperanto, obligatoire pour les élèves de la section commerciale.

Ce cours a débuté le vendredi 23 octobre.

Quarante-six élèves, jeunes gens et jeunes filles, régulièrement inscrits, assistaient à ce cours, qui se poursuivra pendant toute l'année scolaire, les vendredis, de 18 h. 30 à 20 heures.

FRESNES-SUR-ESCAUT. — C'est devant une salle comble que se déroula la fête esperantiste le dimanche 11 octobre.

M. J. Aldebert, le dévoué président du

groupe, présenta les différentes personnalités et excusa M. Pierre Delcourt que ses hautes fonctions empêchaient au dernier moment, et qui dans une lettre rédigée en Esperanto dont la lecture fut donnée par M. Aldebert, nous exprime toute sa sympathie pour notre mouvement.

Ensuite M. Beauvois, maire de Fresnes, en une subtile improvisation, définit le rôle pacificateur de l'Esperanto.

A son tour, M. Humez, président de la Fédération Esperantiste du Nord, en une causerie du plus haut intérêt, fit l'apologie de la langue auxiliaire.

Vint ensuite la partie artistique où figurèrent avantagement : M. Saint-Aubert, président du groupe de Saint-Saulve, dans ses pasquilles paloisantes ; M^{lles} Gonthier, professeur de piano ; Lefebvre, vedette de Radio PTT Nord à Lille, et Barret, présidente du groupe de Valenciennes, qui nous recita des poésies en français et en esperanto.

Suite à ces intermèdes M. Centnersver fit une démonstration d'étude par la méthode directe et quelques membres du nouveau groupe esperantiste interprétèrent avec brio « L'héritage Klodarec ».

Un bal très animé au cours duquel nous eûmes la joie d'entendre encore M^{lle} Lefebvre, termina cette belle soirée de propagande.

Par suite de cette fête, de nombreuses adhésions furent reçues aux cours, dont la première leçon a eu lieu le mercredi 14 octobre, salle des répétitions à la Mairie.

LIÉVIN. — Un cours dirigé par M. Viseux, président du groupe, a lieu toutes les semaines à la Mairie, à 18 h. 15.

LONGPRÉ-LES-CORPS-SAINTS. — Supera Atesto pri lernado : S-ro Gaston Haudréchy. (Ekzam. : Gicquel, Waringhien).

SAINT-SAULVE. — Post la malferma demonstracio de la Ĉeĥ-metodo, al la kurso alskribiĝis 17 gelnantoj, kiuj regule ĉeestas la lecionojn tri tagojn ĉiusemajne.

VALENCIENNES. — Vendrede la 13^{me} de novembro vizitos nian urbon S-roj Guillaume kaj Naoumoff el Parizo. Vespere ili prelegos respektive pri la nuna stato de la franca Esperanto-movado kaj niaj esperoj por 1937, kaj pri la renaskiĝo de la movado en nia regiono kaj restarigo de la grupo tuj post la milito.

WALLERS. — Dimanche 18 octobre a eu lieu le matin, à la Mairie, l'exposition des correspondances en Esperanto avec tous les pays du monde, et une partie du matériel de l'exposition fédérale ; dans l'après-midi, même salle, une conférence de M. Noël Pielle, président du Comité inter-groupe de la région de Valenciennes, assisté de M^{lle} G. Hansen.

Les cours ont repris fin octobre et sont dirigés par M. Brassart, instituteur, secrétaire du groupe de Wallers.

IZOLULOJ EN PAS-DE-CALAIS KAJ SOMME

Depost tri semajnoj leteroj estis senditaj al izoluloj loĝantaj en Albert, Corbie, Montdidier, Combles, Hornoy, k.t.p. kun propono de vizito, kunveno. sendo (da afiŝoj, traktoj kaj aliaj propagandiloj. Bedaŭrinde neniu respondo ankoraŭ alvenis.

Samideanoj, kiuj loĝas en tiuj lokoj aŭ havas tie konatulojn estas petataj sin turni al S-ro Paul BRUNET, 7, rue Saint-Michel, en Arras (Pas-de-Calais).



Prelegvojaĝo de Ĵak. CENT

Kiel vi jam certe scias, la 29^a Universala Kongreso de Esperanto okazos en 1937 ĉe la lulilo de la lingvo, en Varsovio.

Por instigi tiujn, kiuj havas sufiĉe da mono por vojaĝi eksterlanden kaj por konatigi tiujn, kiuj ĝin ne havas, kun la ĉefurbo de Polujo, kie nia kara Majstro laboradis por feliĉigi la homaron donacante al ĝi sian genian elpensadon: la internacian komprenilon, Ĵak. Cent. deziras viziti la esperantistajn grupojn de nia regiono kaj prelegi pri Varsovio. Lia prelego estos ilustrata per belaj lumbildoj (vitraj kliŝoj havas normalajn dimensiojn 6,5 x 8,5) afable pruntedonataj de la Franca Asocio de Amikoj de Polujo.

Grupoj kiuj akceptas inviti lin, estas petataj luj rilatiĝi kun li. Adreso: Ĵak. Cent., 9, rue Ferrand, Valenciennes (Nord).

Dana samideanino salutas la Nordfranca Esperantistaron

Karaj francaj samcelanoj,

De la nordaj landoj kaj precipe de la dana Esperantujo mi portas al la franca esperantistaro korajn samideanajn salutojn. Estas por mi tre granda ĝojo esti inter vi. Ĉiam, la esperantistoj sentas sin kiel hejme, sin trovante inter esperantistoj en aliaj landoj, ĉar la tutmonda esperantistaro, estas kiel unu granda familia rondo; tion mi ofte spertis dum miaj vojaĝoj eksterlandaj.

Nia amo al la sama ideo ligas nin kune. Por mi la interligilo kun la francaj esperantistoj estas ankoraŭ pli granda, ĉar al ili ne nur min ligas nia komuna sankta afero, sed eĉ ankaŭ la ligilo de la sango.

Mia franca deveno sin datas de la tempo, kiam la Hugenotoj persekutitaj amase forlasis Francujon kaj enpenetris en aliajn landojn. Kelkaj el ili enmigris la malgrandan Danujon, kie ili ankaŭ trovis sian sorton rekonkante «terurajn» daninojn al kiuj ili perdis sian koron kaj kiel «kapitululoj» restadis en Danlando. Vi do certe ne miras, ke estis por mi speciala ĝojo veni al la ĉarma lando de miaj prauloj por, kunbatalante kun francaj samideanoj, venki la malmolajn

korojn kiuj ankoraŭ ne trovis la vojon al nia mirinda lando Esperantujo. Sed por perlabori per pacaj armiloj, la malmolatan teron, necesas komuna kunlaborado. Eĉ se ni havas malsamajn opiniojn politikan aŭ religian, tio, por la vera esperantisto ne rajtas ludi rolon, ĉar finfine ni laboras por la sama alta celo: la amo, frateco kaj paco tutmondaj.

Se iam ni volas venki la «obstinajn barojn» ni devas pace kunlaboradi. Tio estas la devo de ĉiu vera esperantisto kaj ĝi estas la sola ilo per kiu ni povas efektiviĝi niajn idealojn.

Esperante havigi ankaŭ bonegan kunlaboradon kun la nordfranca esperantistaro, mi restas ĉiam al via servo por nia afero.

Samideane kaj kore salutas vin.

Gertrudo HANSEN.
(el Kopenhago)

RONDVOJAĜO



La 10^a de aŭgusto, niaj gesamideanoj Delavigne, en Longpré, akceptis samideaninan S. Cijera, aŭstrianinan loĝantan en Ĉekoslovakujo post kiam ŝi pasigis julion en Malo-les-Bains.

Ŝi ne komprenas la francan lingvon, sed helpe de Esperanto, ŝi kuragiis viziti Francujon. Post la Dunkerka grupo, estis por la grupoj Longpré kaj Airaines granda plezuro aŭskulti ŝiajn paroladojn pri bela Aŭstrujo, kaj pri esperantista libertempejo Lazne-Belohrad, en C. S. R. Ankaŭ la prelego pri Franzensbad kun la reuniganta torfbanejo kaj la diversaj fontoj estis tre interesa.

F-ino Cijera forveturis la 10^{an} de aŭgusto al Parizo por renkonti tie esperantistojn kaj post kelkaj tagoj vojaĝi al Arnhem, kie la Esperanto-domo aranĝis malmulte kostan rondvojaĝon tra Nederlando.

Poste ŝi revenis hejmen por rakonti pri sia agrabla vojaĝo en Francujo kaj en Nederlando helpe de esperantista amikaro al tieaj esperantistaj grupoj.

F-ino Cijera estas eksinstruistino pensiita en Aŭstrio kaj ŝi dediĉas sian tutan tempon al Esperanto, kies grandan valoron ŝi jam de 10 jaroj ekkonis. Nur tien, kie estas esperantistoj, F-ino Cijera vojaĝas ĉar estas pli agrable trovi tiujn geamikojn ol sidi ĉie sola kaj enuigi, kio okazas kie ne estas esperantistaj grupoj.

Esperanto multe helpas dum vojaĝo kaj estas tempo ke ĝi plimulte disvastiĝu por la bono de ĉiuj vojaĝantaj homoj.

G. H.

Ĉiam kaj ĉie portu la Verdian Stelon...

KURAĜE, ANTAŬEN!

— Saluton, Fraŭlino!...

— Ha! Sinjoro Laglirio, kia plezuro vin revidi! Bonan tagon!

— Ĉu vi pasigis bonajn libertempojn?

— Ho! bonegajn, Sinjoro! Mi iris al Arnhem, kie mi sekvis la perfektigan kurson de Sinjoro Cseh, de la 3^a ĝis la 8^a de aŭgusto. Kia agrabla restadejo, la Esperanto-Domo! La kvin Dunkerkanoj kiuj partoprenis, pasintan jaron, la seminarian kurson, multe laŭdis la allogcojn de ilia restado en Nederlando. Ili pravis! Ni estis ok, tiu-ĉi jaro, kaj ĉiuj, ni estas ravitaj pri nia vojaĝo.

— Feliĉa Fraŭlino! Mi envas vin. Mi envas ankaŭ ĉiujn kiuj vojaĝis por Esperanto dum tiuj lastaj semajnoj, ĉu en Aŭstrio, ĉu en Anglujo, ĉu en Francujo!

— Paciencu, kara samideano, via vico venos baldaŭ, mi treege deziras al vi la feliĉon vojaĝi esperante tra la mondo.

— Jen, nia afabla kasistino!...

— Bonan!

— Bonan! Ĉu mi povas sciigi pri kio vi parolas tiel serioze?

— Jes, certe, se vi konsentas helpi nin.

— Se tio estas eble, mi ne diros: Ne!

— Kiam via kaso estos sufiĉe plena por pagi al ni...

— Haltu! haltu! aŭ mi forkuras de ĉi-tie!

— Terura verbo! «Pagi». Nia kasistino ne povas ĝin aŭdi!...

— Ĉu jam la profesoro alvenis? Ĉu estas multaj personoj en la kursejo?

— Jes, sed, silentu, ŝi rakontas historion. Ni eniru!

« Pasintan vintron, en malgranda komunumo de la Dunkerka regiono (ĉu mi ĝin nomus? Se vi estas scivolema, demandu la nomon al Verda Nazo...) estis urbestro kio devis disdoni karbon al kelkaj malriĉegaj familioj.

Partigi dudek unu sakojn inter sep familioj estis por la maljuna urbestro grava problemo. Ne ĉiuj ŝatas matematikon! Li scipovis nur unu kalkulon: la adicon.

Li longe pripensis, cerbumis, kaj finfine diris: « Mi kredas ke mi povas doni dudek sakojn al ĉiu familio ». (Li estis sola, feliĉe.

12
+ 12
+ 12
+ 12
+ 12
+ 12
+ 12
+ 12

Prenante paperon kaj krajonon, li faris adicon tiamaniere: du, kvar, ses, ok, dek, dekdu, dekkvar... kaj, daŭrigante, dek kvin, dek ses, dek sep, dekok, deknaŭ, dudek, dudekunu! Kun kontenteca sopiro, nia urbestro skribis la rezultaton kaj frostis siajn manojn.

Tamen, post kelkaj minutoj, = 21

li pensis ke estus bone montri la solvon de la problemo al sia unua vicurbestro, emerita maristo kiu multe marmeturis. Tiu-ĉi, kvankam li estis spertulo, nur unu kalkulon scipovis ankaŭ: la obligon. Afable li prenis la paperon kaj, skribante, kalkulis laŭvoĉe: sepoble unu faras sep; sepoble du faras dekkvar.

— Mario, ĉu la kazo estas varma?

— Jes, respondis voĉo en la apuda ĉambro.

— Rapidu! du tasojn!

12 Sep kaj kvar... dekunu, mi
x 7 skribas unu kaj retenas unu; unu
7 kaj unu: du!

14 — Jes, sinjoro urbestro, vi estas
= 21 prava. Vi povas certe disdoni dekdu sakojn al ĉiu mizerulo!

La du viroj trinkis tason da kafe, glaseton da juniperbrando, fumis pipon, interparolis pri diversaj aferoj kaj nia urbestro, rigardinte la horloĝon, dankis kaj adiaŭtis sian amikon.

Trankviligita, sed ne tute, li eniris, preterpasante, la domon de la dua vicurbestro, viro kiu iam lernis dum tri jaroj en la lernejo de sia vilaĝo.

— Jen la afero, diris la urbestro!

— Estas necese fari dividadon, respondis la alia Minuton, mi petas! Kie estas miaj okulvitroj? Ha! tie; ĝusmetinte ilin sur sia longa nazo, li faris tuj la sekvantan kalkulon por montri sian kapablecon. Sinjoro la urbestro aŭdis murmuri: En dudek-unu kiom da foje estas sep?... La kalkulado anto pripensis longe, tuis, brue nazenspiris, kaj diris: « mi provos unue: unu. Unuoble sep faras sep. Dudek-unu minus sep estas... estas dekkvar ». Li skribis dekkvar kaj, ĝojradia, rapide, laŭvoĉe: « dekkvar per sep estas du!

21 7
14 —
12 —
0

— Jes, jes, sinjoro urbestro, vi pravis, vi pravis... »

Feliĉe ke la sekretariino de la urbedomo (la vidvino de la eksinstruisto scipovis regulan matematikon... sed ŝi renkontis multajn malfacilaĵojn, komprenigante al la tri viroj la veran solvon de la problemo.

— Ĉu plaĉas al vi mia rakonto?

— Jes fraŭlino, Vi povas ĉiufoje nin amuzi per anekdotoj similaj al tiu-ĉi.

— Mi ne dubas pri tio, karaj ĝelernantoj. Hodiaŭ estas nia unua kunveno. Mi ne volis lacigi miajn aŭskultantojn per gravaj gra

matikaj reguloj aŭ malfacilaj ekzercoj. Do, mi elektis agrablan temon por vin meti denove en la bonan vojon!

Antaŭ proksimume tricent jaroj, nia bona franca poeto "La Fontaine" diris: « La rakonto pasigas kun ĝi la maksimumon... » « Estas necese instrui kaj plaĉi. »

Ĉu vi volas ke ni serĉu kune la moralon de tiu hodiaŭa rakonto?

Ne kontentiĝu per unu kalkulon, per la akiro de la elementaj konoj en Esperanto! Perfektiĝu, mi petas! Estu fidelaj al la kursoj, la kunvenoj dum tiu jaro kiu tiel bone komencas. Legu viajn gazetojn, prunteprenu librojn en la biblioteko, ne prokrastu viajn korespondadojn ĝis la grekaj kalendaroj... mi petas!

Rigardu fikse vian verdan stelon kaj marŝu

Kuraĝe antaŭen

Jen estas tio kion atendas nun de vi.

Via ĉiam fidela

FLANDRA ANTIKVAĴO.

=====

DANKON !

Ĝi estas la unua vorto, kiun, en ĉi-tiu unua numero de *Nordfranca Esperantisto* ni volas diri al ĉiuj kiuj helpis al ni en la nefacila laboro kunligi niajn tri bultenojn kaj organizi la regulan aperadon de la nova revuo.

Ni volas tulkore danki al niaj multnombraj aprobantoj, al ĉiuj, kiuj promesis regule kunlaboradi kun ni, ĉu, verkante artikolojn, ĉu konigante nian revuon, ĉu alimaniere.

Kortuŝitaj ni ja estas tralegante la jam ricevitajn leterojn, en kiuj niaj samideanoj sendas bondezirojn por la plena sukceso de *Nordfranca Esperantisto*. Ni deziras ankaŭ ĉi-tie tutspeciala danki al la « baptopatrina » (bedaŭrinde ĝis nun sen « baptopatro ») de *Nordfranca Esperantisto* bona feino, kiu ĉe la lulilo de nia revuo malavare donacis cent frankojn por subteni la unuajn paŝojn de la bubeto kiu estas nia organo.

Por obei ŝian deziron ni ne publikos la nomon de tiu bonfarantino, al kiu ni ŝuldas same kiel al S-ro Birembaux, lerta desegnistoj, kaj al nia majstro-presisto, la belan aspekton de *Nordfranca Esperantisto*.

Al ĉiuj, niajn plej sincerajn dankojn.

La Redakeio.

=====

Nordfranca Esperantisto

por vivi bezonas vian helpon

ABONU ĜIN

ABONIGU VIAJN AMIKOJN

VARBU MULTAJN ABONANTOJN

=====

Bravo les Lyonnais !

Le Professeur Philip, député de Lyon, a fait parvenir à tous les Parlementaires une lettre relative à l'Esperanto. De son côté et en même temps, le Club Espérantiste Universitaire de Lyon et de la région a envoyé à tous les Députés et Sénateurs, un questionnaire ainsi rédigé :

1. Approuvez-vous l'idée de l'Esperanto, langue auxiliaire internationale, qui n'a pas pour but de remplacer les langues nationales, mais de jouer le rôle de langue seconde, que chaque homme devrait connaître en plus de la sienne pour se faire comprendre des hommes dont la langue est différente ?

2. Désirez-vous être informé sur les résultats de l'enquête que nous avons entreprise auprès des parlementaires de France et de l'étranger ?

3. Approuvez-vous l'idée de l'introduction de l'enseignement de l'Esperanto dans le programme de l'année supplémentaire d'études pour les enfants de 13 à 14 ans et prévue dans le projet gouvernemental ?

4. Autres considérations.

A la fin de septembre, nos amis lyonnais avaient déjà reçu 155 réponses de députés et sénateurs, dont nous publierons dans notre prochain numéro la liste nominative.

★

Nous sommes heureux de féliciter chaudement nos amis lyonnais pour leur intelligente initiative et les résultats féconds qui ne manqueront pas d'en découler.

Nous associons de tout cœur dans ces félicitations M. Duchochois, de Boulogne-sur-Mer, qui de son côté a envoyé le même questionnaire à de nombreuses personnalités de la région, de qui il a déjà reçu de nombreuses réponses favorables.

Nous aurions certes préféré voir prendre cette belle initiative par la S.F.P.E. qui, rédigeant une lettre type, aurait prié toutes les Fédérations Espérantistes de France, au besoin par l'intermédiaire des Groupes locaux, de faire en même temps la même démarche auprès de tous les parlementaires et faire déclancher ainsi une offensive générale dans notre pays en faveur de l'Esperanto.

Sera-t-il donc toujours dit que l'initiative privée doit sans cesse suppléer à la carence des organisations officielles et que nous ne puissions pas travailler d'après un plan général d'action bien étudié et bien établi ?

C. V.



Oni tro ofte forgesas paroli pri la vir-beleco, kaj laŭdojn nur al la bela sekso tro volonte (laŭ ni!) oni jetas, kiel bukedon.

La « bela sekso » ne estas tiu pri kiu oni ĝenerale parolas. Tiu veron, neniu inter ni elita legantaro ignoras, kiel ĝi ne ignoras ke nur pro granda (sed ne sincera!) gentileco oni atribuas « belecon » al la ina parto de Phomaro.

Naturo kreis la virojn, florojn, birdetojn, belaj nur por okuplezurigi la virinon! Sed la virinoj, ĉar ili estas jaluzaj, ĉiam forgesas tion kaj forrabas al ni, belegaj sed malfeliĉaj viroj, la gloran kronon de la homa beleco.

Unu el niaj bonaj amikoj, por protesti kontraŭ tiu ina kaj fi-farmaniero kiu ege malutilas al ni.

— belaj kaj adorindaj viroj — kaj inciti la inoj esti iomete pli modestaj, havis la bongoran ideon aranĝi konkurson celante eltrovi inter la vira samideanaro de la departemento Nord. Pas-de-Calais kaj Somme, la plej belan reprezentaton de nia sekso; poste, per publikado de la portreto de la feliĉa « elektito », ebligi al ĉiuj inoj la admiri kaj ekamigi.

Post multaj kaj seriozaj klopodoj (la belaj viroj estas tiom multnombraj!) nia kunlaboranto sukcesis eltrovi tiun maloftan « perlon ».

Kaj hodiaŭ ni havas la grandan plezuron montri al niaj legaŭtoj la portreton de la plej bela esperantista viro, kiun pro sia beleco ni titolnomas : ESPERANTISTA " APOLLO " 1936.

VERDA NAZO.



" APOLLO " 1936

Konsilioj al Propagandistoj

Krom siaj konataj kvalitoj, nia kara lingvo posedas alian eon malofte cititan. Ĝi permesas malkovri novaĵojn en preskaŭ ĉiuj kampoj de la homa agado.

Mi deziras atentigi niajn samideanojn, pri tiu eco, por ke ili uzu tiun argumenton laŭokaze.

Jen kelkaj disaj ekzemplojn :

Unue pri natursciencoj.

Oni kredas ke ekzistas pontoj inter homoj, bestoj kaj kreskaĵoj. Esperanto sciigas nin, ke papo estas tiu ponto; ĉar kiam papo agas ĝi naskas papagon, kaj avo de papo estas papavo, do kreskaĵo.

Estas ŝercaĵo serĉi vilojn sur ovo; sed ekzistas speco de ovo sur kiuj oni trovas vilojn; ili estas paskaj ovo, ĉar la paskviloj estas afero trovebla.

Oni diras ke nur bestoj povas terni; sed per Esperanto oni konas la lanterno.

Kiu estas la kreskaĵo samtampe la plej dividebla kaj la plej arda? estas la milio ĉar oni parolas ofte pri miliono kaj miliardo.

Bovoj ne estas konataj kiel maristoj; fakte ili estas tre mallertaj maristoj; pro tio oni ne diras ke ili remas, sed ke ili remaĉas.

A. CHAIGNEAU.

(daŭrigota)

ANEKDOTO.

En Pariza aŭtobuso...

Eleganta maljunulo sidas antaŭ juna, freŝa dancistino. Post kelke da tempo, la maljunulo diras al sia antaŭulino :

— Fraŭlino, se vi montras al mi viajn kruojn, mi donos al vi 100 frankojn.

La junulino, pro la prezo, akceptas kaj enpoŝigas la 100 frankojn. La sinjoro admiras.

— Fraŭlino, se vi levas ankoraŭ iomete vian robon, mi donos ankoraŭ 100 frankojn.

La okazo estas bona, ŝi pensas... Do, ŝi levas la robon kaj enpoŝigas denove 100 frankojn.

— Sinjoro, ŝi diras, se vi donas al mi 500 frankojn, mi montras al vi kie mi estis operaciita pro apendicito.

Kontentega, la frandema maljunulo donas 500 frankojn, kaj la dancistino, mallevante la vitron de la aŭtobuso diras :

— Ĉu vi vidas la hospitalon " Beaujon " ? Nu estis tie !

STENOGRAFIO

KIO ESTAS STENOGRAFIO ?

Dum longaj jarcentoj ĝi estis skribo lernebla nur de instruitaj homoj, kiuj longe penadis, por kapti la paroladojn de la oratoroj. Hodiaŭ ĝi estas pli simpla afero, kiu utilas al multaj oficistoj, kaj estas tre facile lernebla de ĉiuj.

IOM DA HISTORIO.

La rapida skribo estis uzata en Romo kvindek kvar jarojn antaŭ Kristo. La aŭtoro de la tiam uzata sistemo estis Tiro, liberigita sklavoj de la fama oratoro Cicero. La "Tiro'aj notoj" estis uzataj ĝis la 14^a jarcento.

Stenografaj sistemoj aperis en Britujo, komence de la 17^a jarcento. Kiel menciindaj sistemoj mi nomos tiun de Taylor, ĉar de ĝi devenis fama franca sistemo; tiun de Pitman, kiu estas preskaŭ sole uzata en ĉiuj landoj de angla lingvo, kaj tiun de Gregg, kiu ĉiujare progresas en tiuj landoj.

Stenografio aperis en Francujo meze de la 17^a jarcento. Mi nomos nur kelkajn aŭtorojn: Bertin, kiu alfaris al la franca lingvo la anglan sistemon de Taylor; Prévost, kiu faris ŝanĝojn en la sistemo de Bertin; Delaunay, kiu — interkonsente kun Prévost — faris kelkajn modifojn en la sistemo nune konata sub la nomo "Prévost-Delaunay".

Ĝis tiam, stenografio estis konsiderata kiel tre malfacile lernebla kaj uzebla. Tamen kelkaj aŭtoroj, inter kiuj estas Conen de Prépéan, Grosselin kaj Aimé-Paris, kreis fonetikajn sistemojn, lerneblaj de ĉiuj junuloj, por noti la lecionojn de siaj instruistoj.

Post ili, Emile Duployé volis ebligi instruigon al ĉiuj, kiuj ne povis lerni la longan skribon. Li starigis kaj fervore propagandis sistemon, kiu rapide divastigis, ne nur en Francujo, sed ankaŭ en aliaj landoj. Dank'al supera grado nomita "Metagrafio" tiu sistemo trafis multajn sukcesojn.

La tria lando, kie aperis stenografio estas Germanujo. Mi citos nur la nomon de Gabelsberger, kiel aŭtoron de la plej fama germana sistemo, kaj tiun de Pfratoj von Kunowski, kiuj multe uzis Esperanton por propagandi sian sistemon, de kiam la germana registaro decidis, ke nur oficiala «Unueca Stenografio» estas instruebla en Germanujo. Hodiaŭ, laŭ dekreto de Hitler, neniu propagando povas esti farata krom por la Unueca Stenografio, kaj la organizoj de la skolo Kunowski ankaŭ malaperis.

La anglaj kaj francaj sistemoj estas «geometriaj», kaj la germanaj sistemoj estas «grafikaj».

Mi ne parolos pri aliaj landoj, ĉar — almenaŭ dum longa tempo — ili uzis nur alfabetojn de la anglaj, francaj aŭ germanaj stenografioj.

PROFESIA SKRIBO.

Ĝi utilas al multnombraj sekretarioj, por skribi la literaron diktatan de la estro en firmoj komercaj, industriaj, administraciaj, bankaj, gazetaj, k. t. p.

Pli lertaj praktikistoj sekvas la parolon kaj povas noti diskutadojn en kunvenoj, same kiel predikojn, pledojn, toaŝtojn, paroladojn superajn kursojn, improvizaĵojn de verkistoj, k. t. p.

Aliaj deoras oficiale en Konsilantaroj urbaj, departementaj, provincaj kaj en parlamentejoj.

SKRIBO POR ĈIJ.

Dank'al sia simpligo, stenografio fariĝis utila por ĉiuj. Lernanto uzas ĝin, por noti la instruadon de sia profesoro; tiu lasta preparas siajn lecionojn, notante ĉiujn klarigotajn ideojn antaŭ ol la penso forkuros. Verkisto kaj paroladisto forlasas nenian ideon, kies improvizo — ne haltigita de malrapida skribo — konservas plenan originalecon.

Advokato kopias dokumentojn kaj notas la argumentojn de sia kontraŭdiranto. Tiaj mencioj povus esti multnombraj, ĉar kiu lernas, legas, pensas, negocas, unuvorte ĉiu, kiu devas skribi, tiu bezonas stenografion, kies utila uzo prezentiĝas ĉiutage.

STENOGRAFIO KAJ ESPERANTO.

Esperanto ebligas gajni spacon, stenografio tempon; ĉiuj lingvoj estas stenografieblaj kaj posedas lertajn praktikistojn. Esperanto devas havi nenian malsuperecon. Por ĝia tuja uzebleco — kiel ekzemple en Komercio — nia lingvo bezonas lertajn stenografistojn, kiuj fariĝos sekretarioj de la uzantoj de Esperanto.

La diversaj civilizacioj formiĝis dank'al instruado donita de l'majstroj. Tiu instruado estas konservita dank'al stenografistoj, kiuj tiamaniere estas veraj helpantoj de la civilizacio.

Ĉar dank'al Esperanto ĉiuj popoloj pli kaj pli interkonsentos kaj interunuigos, ni povas esperi, ke iom post iom, la Esperantistaro estigos civilizacion pli grandan, pli belan, pli perfektan ol ĉiuj antaŭaj kaj, por helpi al tio, estas dezirinde, ke ĉiuj lernu stenografion, kaj samideanoj speciale talentaj kaptu por la estonteco la belajn paroladojn de niaj oratoroj kaj la bonajn instruadojn de niaj eminentuloj.

P. FLAGEUL.

En venonta numero, legu:

«PRI TUTMONDA STENOGRAFIO».

Scienca Angulo

Ĉu Skandinavoj en Meksiko ?

Estas pruvite ke nordaj aventuristoj tuŝis Amerikon multe pli frue ol Kristoforo Kolumbo. Se malestus aliaj atestoj, tie estas la lingvoptika ŝtono malkovrita en 1898 de Olof Ohman en Kensingtono (Minesoto, Usono), rilate al malfeliĉa ekskurso kiun, dum 1362, faris tridek svedoj kaj norvegoj.

Stongravuraĵoj el la Malnova Mondo estas troveblaj el Kanado ĝis Brazilo. Meksiko lin havas ĉe multaj lokoj kiel Vera-Cruz (orienta marbordo), Ciapas (suda ekstremo) Durango (centro), Gerero kaj Kalifornio (pacifika marbordo).

Antaŭ malmultaj monatoj oni malkovris en la ĉirkaŭaĵoj de Perote, Vera-Cruz, megalitikan ŝtonegon mezuranta 3.40 per 0 m., plena je gravuraĵoj; s-ro avokato Ramon Mena, el la Arkeologia Nacia Muzeo, studadis la signojn kaj opinias esti inter ili egiptaj, sinaikaj, hebreaj, fenicaj, demotikaj, egiptaj, arameaj kaj almenaŭ ses runikaj. Tiu-ĉi miksaĵo klarigas la sama arkeologoj per la ĉeesto, inter la translokiĝintaj gentoj de homoj el diversaj rasaj devenoj avankam el la sama grafika familio, escepte la skandinavoj.

Anaŭak, tio estas la malnova Meksiko, estis tramigrata de nekalkuleblaj invadantoj, kiuj postlasis mirindajn ruinojn kaj piramidojn en Jukatano, Mitlo, Monte Alban, k. t. p.; kaj la sep gentoj kiuj pilgrimadis tra la tuta nordokcidenta marbordo ĝis veni fondi la metropolon, alportis, krom la naciĝecon, lingvon frata al la helena (nauait: helzona). En nia mitologio estas senegala figuro: tiu de sacerdoto Kecalcoatl (multvalora serpento), eble islandano nomita Olaf, sciulo virta, malamiko al homaj oferoj, kiu instruadis sciencojn kaj artojn al enlandanoj kaj enmigrintoj, kaj kiu, post kelkajara restado, decidis reiri sian patrolandon, promesante reveni; ĉagrenegiĝintaj siaj adorantoj diigis lin je la planedo Venuso; la hispana konkero estis facila tasko pro ke tio imperiestro Moteuhsoma kredis esti Kecalcoatl revenanta.

En kelkaj amerikaj landoj oni estas trovintaj blankajn gentojn; en la Teŭantepeka ŝtato (Meksiklando), deviga trairejo por la migrantaj fluoj, abundas, meze la sapoteka gento, malaltstatura kaj malhelkolora, individuoj kies alteco kaj karakterizaĵoj malkaŝas nordan pradevenon.

Pro ĝiaj grandaj rezervoj, Meksiko estas

Por la Filatelistoj...

VORTARETO : Koloroj

Blanc	blanka
Bleu	blua
Bistre	bistra
Marron	kaŝtana
Gris	griza
Jaune	flava
Rouge	ruĝa
Vert	verda
Ocre	okra
Orange	oranga
Roux	flavruĝa
Vermillon	cinabro
Carmin	karmina
Rose	roza aŭ rozkolora
Ecarlate	skarleta
Couleur fauve	brunruĝa
Lie de vin	vinruĝa
Mauve	malvoviola
Violet	viola aŭ violkolora
Noir	nigra
Lilas	siringviola
Vert glauque	marverda
Couleur chair	flavroza
Couleur chamois	ĉambruna

La Filatelisto.
(daŭrigota)

Ni ridu iomete...

AMIKINOJ...

— Mia fianĉo skribas, ke li treege malpacience atendas la horon, en kiu li povos edziĝi al la plej bela virino de la mondo.

— Ho, la fripono! Kial do li fianĉiĝis al vi?

EN ARGENTA JUBILEO

— Ne estas malbona afero la edziĝo, ĉu ne vere?

— Ne, ne! Nur la unuaj dudek jaroj estas pezaj, sed poste oni al kutimiĝas.

lando de la estonto. Ankaŭ de la pasinto. Ĝiaj arkaikaj ŝtonoj ne parolas ankoraŭ; kiam ili faros tion, ni vidos transmarŝi ombrojn el Atlantido (atlan signifas multan akvon, en nia lingvo), Egiptio, Ĥinujo, Helenlando, Skandinavio, k. t. p.; el ĉiuj estas trajtoj en la vizaĝo, en kredo, kutimoj kaj lingvoj, en la popola psikologio, tiel komplika ke eĉ ni, enlandanoj, malatingas kompreni...

Jesús Amaya

(el MEKSIKO, en Renobasion).

DISTRAĴOJ

En ĉi-tiu paĝo, ĉiumonate ni proponos al niaj legantoj facilajn problemojn.

Ni tre deziras ke multnombraj ili ilin solvu. Nia celo estas « **perfektigi amuzigante** ».

Kiel « **DISTRAĴOJ** » funkcias ?

La personoj kiuj sendas solvojn al la proponataj problemoj partoprenas al tre agrabla kaj facila konkurso : sendante solvojn ili ricevas premio-poentojn kaj ĉiu monato du premioj estos disdonataj al la du solvintoj kiuj ricevis la plej grandan kvanton da poentoj. Ĉar la konkurso estas « **daŭra konkurso** », ĉiuj partoprenantoj devige ricevos premion siavice.

Sed, atentu ! Vi devas **regule** sendi solvojn ĉar la poentoj de tiuj kiuj ne sendos solvojn dum tri sinsekvaj monatoj ne plu valoros. Do, estu fidelaj partoprenantoj !

BONAN KURAĜON !

★

Pri sendo de interesaj problemoj aŭ enigmoj (redaktataj en esperanto, kompreneble), ni petas tiujn kiuj povas tion fari sendi al ni problemojn aŭ enigmojn kun iliaj solvoj. Ili ricevos premio-poentojn, kondiĉe ke ni publikigu iliaj proponojn.

★

Sendu solvojn aŭ komunikaĵojn pri tiuj « **DISTRAĴOJ** » nur al nia kunlaboranto : S-ro **DAMMEREY**, instruisto, en BORRE, par Hazebrouck (Nord).

1. PROBLEMO

17	14	2
2	16	12
12	7	10

Metu la nombrojn

2 4 6 8 10
12 14 16 18

en tiun-ĉi kvadraton tiel ke la sumo horizontale, vertikale kaj diagonale estu **30**.

2. SILAB-ENIGMO

A AG AK CA DO GRO IN
JA KO KO LAR LO LO LU
MO NA NO NUK O O O OS
PO PO PRO RA RO SA SO
SO TI TRO UL UR VO VO.

El ĉi-tiuj 36 silaboj faru 18 du silabajn vortojn kun la jenaj signifoj :

1. Hejma birdo
2. El la kokino - ovo
3. Ŝatas akvon - akvo
4. En la maro - akvo
5. Legomo - papo
6. Necesa kun legomoj - karto
7. Sovaga porko - porko
8. Malbona, kruela besto - besto
9. Marŝas sur la plandoj - tero
10. Granda kato - tigro
11. Ŝatata kun blanka vino - vino
12. Aŭtuna frukto - pomo
13. Terura birdo - aglo
14. El la porko - kano
15. Gracia kvarpiedulo - kano
16. Sufikso - in
17. Sufikso - ul
18. Epoko - jaro

Post tio, la unua litero de ĉiu vorto donos frazon kiu estas mia esprimo.

ANONCETOJ

Prezo de la anoncetoj :
Unu linio kostas 2 frjn.
Favoro al niaj abonantoj :
ĉiu abonanto rajtas enpresigi senpage anonceton (tri linioj) unu foje en la jaro.

Sin turni rekte al la Presisto de Nordfranca Esperantisto en Longpré-les-Corps-Sts (Somme).



VENDOTA, en tre bona stato :
NOVA UNIVERSALA VORTARO
Maurice Lachatre
(2 volumoj) - Eldonita en 1865

☞ Sin turni al la Presisto de N.E.